


# la Riverego

---

Bulteno de la Esperanto-Societo Kebekia  
Marto 1988-a. N-ro 10-a. Jarkolekto 3-a.

## Kebekio verdigu !



de Normando Fleury

Vi certe ŝatus loĝi ĉe strato Esperanto, apud parko Esperanto aŭ almenaŭ en loko, kie troviĝas « Esperanto-io » !

Baldaŭe en Montrealo tio efektiviĝos ĉar la komisionanoj pri loknomigoj akceptis nomi sufiĉe grandan parkon ĉe la riverego « PARC DE L'ESPERANTO ». Ni fieras pri tio kaj se ni sukcesis tion en la plej granda urbo en Kebekio, certe tio eblas en via loĝloko.

Ĉu vi ŝatus esti loka peranto ? Pli efikas kiam enloĝanto de iu loko petas la nomigon al la lokaj instancon ol kiam la estraro de E.S.K. faras tion el fora Montrealo.

Se vi pretas kunhelpi nin, ni pretas kunhelpi vin. Unue, vi trovu la nomon de la respondeculo pri la nomigo de publikaj lokoj en via loĝloko. Sendu al ni la nomon kaj la kompletan adreson. Ni sendos poste al vi la dokumentojn. Vi simple post subskribo de la petletero, transdonos au sendos la tuton al la taŭga persono. Poste vi atendu kelkajn semajnojn sed ne tro.

[ al paĝo 3 ]

## Anoncetoj

**Mi serĉas** Esperantiston, prefere studinta en universitato, por praktiki kaj ne forgesi la lingvon Esperanto. Interŝange mi povas instrui la Italian, la Anglan kaj la Francan al tiu aŭ al ties familianoj. Mi akiris tiujn lingvojn dum vojaĝoj. Telefonu al 514/931.0020 kaj petu Rikardo'n.

---

**La direktoro** de la Lando Oficejo baldaŭ forlasos sian oficon. Estus bone, por ŝpari translokigon, se Montrealano alprenu la taskon. Por pliaj informoj, kontaktu Sylvanon Auclair, 270.8856.

---

**Volas korespondi** kun samideanoj: Martin Lavallée, 1465, rue Madeleine, Saint-Amable JOL 1N0.

---

**Le secrétaire-trésorier** de la S.Q.E. aimerait recevoir l'aide bénévole de Montréalais pour rationaliser le service d'information de la société. Sylvain Auclair 270.8856. □

Bulletin trimestriel de la Société québécoise d'espéranto.

*La Riverego* estas eldonata de Esperanto-Societo Kebekia. Aperas trimonate.  
Eldonkvanto: 200. ISSN 0830-9574. Dépôts légaux: bibliothèques nationales du Canada et du Québec.

Premier trimestre 1986.

Redaktanto: Sylvain Auclair.

Kontribuis Edmond Brent, Normand Fleury kaj Bertil Wennergren.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.


Senpage por la membroj de E.S.K. Por la aliaj: jara abono: 5 \$ por mara sendo; 6 \$ por aera sendo. UEA-kodo: kebk-d.

Unuopa numero: 1,50 \$.

Limdato por la venonta numero: 1-a de junio 1988-a.

Adreso: Esperanto-Societo Kebekia  
C.P. 126, succ. « Beaubien »  
Montréal, Québec  
KANADO H2G 3C8 telefono: (514) 495-8442

## En la *Verdinsuleto*



*Tiu artikolo baziĝas ĉe parolado inter la redaktanto kaj Louis Langlois, redaktanto de Verdinsuleto.*

Antaŭ kelkaj jaroj, S-ro Petro Collinge gvidis Esperanto-kurson en Saint-Jean-sur-Richelieu. De tiu kurso naskiĝis ia Esperanto-grupo, la *Ibervila Esperanto-Ligo*. Ĉefaj membroj de tiu ligo estas Edgardo kaj Ludoviko Langlois. Post printempa E.S.K.-a renkontiĝo en Ibervilo, antaŭ kelkaj jaroj, la ligon plej famigis la nun tri-jara eldonado de bulteno, nome *Verdinsuleto*, kiun redaktas Ludoviko.

I.E.L. taŭge nomis sin ligo, kaj ne klubo. Ĝiaj membroj neniam kunvenas; fakte, pli bone ni diru, ke temas nur pri ricevantaro de *Verdinsuleto*. La bulteno estas plej grava por la ligo: ĝi... ligas la ligon. Ĝi tute ne estas movada revuo, sed multe pli kultura. Ĝi estas maniero, kiun elektis la I.E.L.-anoj por plibonigi sian Esperanto-konon. Tial la lingvo-nivelo ne estas ĉiam plej alta, ĉefe en la unuaj numeroj. Estas prave diri ke, ekster Montrealo, post baza aŭ perpoŝta kurso, ne ekzistas multaj eblecoj interrilate plibonigi sian lingvo-kapablon. Oni do povas legi en la bulteno rakontojn, poemojn kaj artikolojn pri plej diversaj temoj, originalajn aŭ tradukitajn de la redakta teamo.

*Verdinsuleto* eldoniĝas trimonate kaj cent-ekzemplere. El tiuj cent, sesdek ekzemplerojn oni sendas eksterlanden: al Ĉinio, Eŭropo, Madagaskaro, Haitio, kaj al kelkaj aliaj lokoj. Nur tridek oni sendas al Kanadaj adresoj. Oni povas sin demandi, kial la ligo nomiĝas Ibervila, ĉar ĝi estas vere internacia! Tiuj eksterlandaj ricevantoj ankaŭ kontribuas al la bulteno per diversaj skribajoj.

---

[ sekvo de la unua paĝo ]

Vi telefonu al la respondeculo por ekscii, ĉu li bone ricevis vian leteron kaj por diri, ke vi pretas doni pli da informoj laŭbezzone. Vi poste raportu al ni pri la rezulto. Estas facile, ĉu ne?

Jam jesis Montrealo kaj LaSalle. Ni atendas respondon de Anjou kaj de Laval. Laŭ ni, multaj gravaj lokoj kiel Bromont, Granby, Hull, Lévis, Longueuil, Québec, Rouyn, Sherbrooke kaj tiel multe plu... devus havi « Esperanto-ion ». Kaj fakte, tio dependas eble nur de vi! □

La ĉefa ekzisto-kialo de la bulteno estas la ŝato de la redaktantoj ĝin fari. La bulteno iome malprofitas, sed ĝi sukcesis krei ligojn inter diversaj homoj, ĝi provas meti pontojn inter insulojn. Pri tio iel rilatas la titolo : *Verdinsuleto*. ( La redaktanto ankaŭ tiel memorigas sian sepjaran ermitan sperton en l'Isle-Verte. ) La bulteno almenaŭ kunigis kelkajn Esperantistojn, kiuj kunkreas kaj kunkorektas tekstojn, cele al la eldonado.

Kelkaj Esperantistoj asertas, ke tiu aktivado iel disigas la fortojn de la ĉi-tiea movado : tiuj tekstoj pli bone kaj volonte aperu en LA RIVEREGO, ekzemple. Ludoviko Langlois konsentas pri tio, sed almenaŭ portempe daŭrigas sian laboron. Li ŝatas vekti diskuton, kaj ankaŭ ŝatus, ke la Kebekiaj Esperantistoj entuziasme kune eklaboru pri iu projekto. En Montrealo, almenaŭ, la kluba vivo ne estas plej alloga por novaj membroj, kiuj malmulte ĉeestas la kunvenojn : nur paroladojn sencelajn, dum la ĉiam samaj « instanculoj » iel regas la movadon, iom disde la « ordinara » membroj, kiuj tamen ne pretas alpreni al si gvidan taskon. Kiel « ordinara » membro, Ludoviko sin demandas, ekzemple, kio okazis pri la memuaro pri la enkonduko de Esperanto en la Kebekiajn lernejojn. Kaj kio okazas en Ŝerbruko ( Esperantisma « insulo » ), nura loko en Kanado, kie oni oficiale instruas Esperanton.

Sed kiu projekto entuziasmigu nin ? Estos en 1992 la tricent kvindek-jara datreveno de la fondo de Montrealo : kial ne tiuokaze eldoni Kebekian antologion ; aŭ eĉ akcepti Universalan Kongreson ? □

Adreso de la Ibervila Esperanto-Ligo :

585, Quatrième rue  
Iberville J2X 3M9

---

## Dans ces circonstances...

Le secrétaire général des Nations Unies, M. Javier Perez de Cuellar, a admis en décembre à la revue de la société italienne d'aviation, Alitalia, que son bureau employait maintenant 266 interprètes et 437 traducteurs. Il a par la suite répondu négativement à une question sur l'espéranto : « Je ne trouve plus que c'est une solution pratique... de toute manière, le nombre des langues n'est pas un vrai problème au sein de la communauté internationale. » Ce ne le serait probablement pas si on avait tous 703 spécialistes à sa disposition ! [ Esperanto, mars 1988 ] □

## Le projet de traduction automatique D.L.T.

Si vous receviez auparavant *Nouvelles sur l'espéranto*, vous avez déjà entendu parler de ce projet. Une firme néerlandaise, B.S.O., entend mettre sur pied un système informatique de traduction, utilisant l'espéranto ( un peu modifié ) comme langue-pivot.

Le système peut déjà traduire des phrases de l'anglais au français, via l'espéranto, à condition de se contenter d'un vocabulaire limité. Si tout se passe bien, le système pour ces deux langues devrait être mis en vente en 1992. D'autres langues devraient rapidement s'y ajouter. Cela dépendra de la disponibilité des spécialistes de ces langues.

Présentement, le projet D.L.T. ( Distributed Language Translation ) est un des deux seuls concurrents sérieux dans ce domaine dans le monde. L'autre est un système japonais de traduction en anglais.

Certains espérantistes voient d'un mauvais œil le projet D.L.T. : enlèverait-il toute utilité future à l'espéranto ? Sans compter que le système sera très coûteux et se limitera à l'écrit, il ne faut pas oublier que le projet nécessitera de nombreuses recherches linguistiques sur l'espéranto et sur ses relations avec d'autres langues, ce qui ne peut qu'augmenter le prestige scientifique de l'espéranto.

C'est pourquoi la firme B.S.O. recherche des espérantistes, de tous les pays, avec des compétences en linguistique. Il s'agit d'une condition essentielle à la réussite du projet. □

---

## Ivo Lapenna

Le 15 décembre est traditionnellement un jour de fête dans le mouvement espérantiste. C'est le Zamenhof-Tago, jour de Zamenhof, initiateur de la langue, qui est né le 15 décembre 1859.

Le 15 décembre 1987, année du centenaire, devait donc être un jour particulièrement heureux. Mais une triste nouvelle nous est venue de Copenhague : c'est en effet ce jour-là qu'est mort à 78 ans une figure importante du mouvement espérantiste, Ivo Lapenna.

M. Lapenna s'est d'abord fait connaître à Zagreb, où il a fondé un réputé club d'étudiants espérantistes. En 1938, il a été nommé membre du Conseil de la Internacia Esperanto-Ligo. Mais c'est en 1954 qu'il est devenu célèbre, alors qu'il a, contre toute attente, fait adopter par la Conférence générale de l'Unesco une résolution favorable à l'espéranto.

Il est alors devenu le leader du mouvement espérantiste mondial, devenant secrétaire général puis président de l'Association mondiale d'espéranto, poste qu'il a occupé jusqu'en 1970. Il a cherché à rendre le mouvement espérantiste plus sérieux, plus crédible aux yeux du monde extérieur, et cherchait à faire disparaître un certain aspect sectaire qui caractérisait le mouvement.

Juriste international ( ce qui l'a sûrement aidé auprès de l'Unesco ) et orateur éminent, il a fait progresser le mouvement espérantiste dans plus d'un domaine. □



# Jubilea kampanjo Kebekia

de Normando Fleury

E.S.K. ne dormadis dum la Jubilea jaro 1987. Fakte, la kvina jaro de nia Societo fariĝis la plej sukcesplena ĉiuflanke. Ni ne celas prezenti al vi ĉion, kio okazis sed ĉefe la amaskomunikilojn, kiuj prezentis ion pri Esperanto. Ni cetere ĉiam bonvenigas informojn aŭ kopiojn de la eldonitaj artikoloj pri Esperanto. □

---

## Revuoj

- Le mémoteq *L'espéranto, langue aux mille visages*. fév. 88. Pierre Chicoine.
- Zone libre ( revue québécoise pour la paix : tirage : 3 000 ) *Espéranto - La progression s'accélère*. fév.-mars 87. N. Fleury
- Méqui-Méquoi ( publié par le Ministère de l'éducation ) *L'Espéranto, la langue internationale, a cent ans d'existence*. mars 87. Victor C. Jaar
- Zone libre *En feuilletant la presse espérantiste*. avril-mai 87. N. Fleury.
- Vice versa ( Le magazine transculturel ) *L'espéranto est centenaire... et toujours vert* / N° 20. Claude Lehuis.
- • • Temps libre ( Magazine de l'Organisation pour le tourisme étudiant au Québec : 50 000 exemplaires gratuits dans les cégeps et le universités ). Plusieurs articles. Pierre Chicoine.
- MTL *Join the klubo*. juin-juil. 87. Ingrid Abramovitch.
- Vélo-Québec. *Vélo-Québec même en Yougoslavie*. automne 87. N. Fleury.
- Time *Le espero de esperanto / The hope of esperanto*. 27 juil. 87. J.D. Reed.
- Partir ( Revue de l'ajisme ) *Une langue aux mille visages*. été 87. Pierre Chicoine.
- Humanitas [ entrevue avec Monique Dussault, peintre, graveure et éditrice ] N° 20-21.
- MonMot ( Revue étudiante du cégep Montmorency ). *Terre en guerre, langue de paix, l'espéranto, l'espoir des peuples de la terre*. sept.-oct. 87. Patrice Germain.

## Journaux

- Nouvelles de l'Est. *Des fleurs à la carte au Jardin botanique*. 16 juin 87. Ville de Montréal - N. Fleury.
- Le Devoir ( Montréal ) *L'Espéranto se fait comprendre depuis 100 ans*. 21 juil. 87. Pierre Roberge (PC).
- La Presse ( Montréal ) *L'Espéranto, pour l'informatique et pour la poésie dans 50 pays*. 22 juil. 87. P. Roberge (PC).
- Le Droit ( Ottawa/Hull ) *L'espéranto, un passeport vers toutes les cultures*. 27 juil. 87. (AP et Le Droit).
- Le Droit *Le D<sup>r</sup> Zamenhof voulait la compréhension universelle*. 27 juil. 87. (PC).

- La Presse *Espéranto : le rêve d'une langue universelle persiste*. 1<sup>er</sup> août 87 (AFP).
- Le Devoir *L'espéranto fête ses 100 ans à Varsovie*. 1<sup>er</sup> août 87 (AFP)
- L'Express de Toronto *L'Espéranto : on en parle depuis 100 ans !* semaine du 1<sup>er</sup> sept. 87. N. Fleury.

## Radio

- CIEL FM Montréal. juin et sept. 87.
- Radio Canada AM à Montréal. août 87 ( Présent ).
- Radio Canada FM à Montréal. sept 87.
- CINQ FM Montréal. sept. 87.
- CBC Toronto. sept. 87.
- Radio Canada à Vancouver. 2 nov. 87. 6 min.

## Télévision

- Quatre Saisons. *L'heureux retour*. 18 fév. 87. 6 min.
- Radio Canada. *Au jour le jour* ( diffusé dans tout le Canada ) 14 sept. 87. 12 min. □

---

# Nouvelles du Conseil

## Liste de membres

La Société québécoise d'espéranto ne publie pas la liste de ses membres, comme d'autres organisations espérantistes. Cependant, les membres qui le désirent ( l'espéranto est avant tout affaire de communication, et il faut savoir avec qui on peut communiquer ) peuvent en faire la demande à la Société, avec si possible une enveloppe affranchie ( 105 mm par 240 mm ). La liste viendra directement de l'ordinateur, comme celle qu'utilise tous les jours les membres du conseil.

À propos, la Société compte maintenant 110, dont environ la moitié sont des Amis et des Amies de l'espéranto.

## Nouveau dépliant

Le nouveau dépliant est prêt : en 2 000 exemplaires, vert, il présente le mouvement espérantiste et contient un formulaire d'adhésion à la S.Q.E.

Le Conseil prévoit aussi l'édition de feuillets thématiques d'information, en français : comment apprendre l'espéranto, l'espéranto et les voyages, la correspondance et la collection, etc.

## Kiosque

La Société tiendra un kiosque d'information lors du festival *Un geste pour la paix*, qui aura lieu en juin, au parc Jeanne-Mance, à Montréal. Bénévoles demandés. □

## La ĉefaj Esperantaj organizaĵoj

[ Cet article est rédigé en espéranto *facile* Il est tiré de *Kontakto*, 1987 : 6 ]

*Universala Esperanto-Asocio* estas la plej granda internacia esperantista organizaĵo. UEA aperis en 1908. Dudek-unu-jara sviso, Hector Hodler, opiniis ke la esperantistoj bezonas organizaĵon. UEA komencis eldoni la revuon *Esperanto*, kiu tamen estas pli malnova ol la organizaĵo. Ĝi aperis ekde 1905. En la sama jaro okazis la unua Universala Kongreso. Poste la UKoj fariĝis la kongresoj de UEA. En 1987, UEA havis 43 642 membrojn en 101 landoj. UEA havas 44 landajn asociojn.

Aparta servo de UEA estas la delegitoj. Delegito estas esperantisto, kiu promesis respondi demandojn de aliaj membroj de UEA. UEA havas 3 319 delegitojn en 74 landoj.

En 1938 aperis *Tutmonda Junular-Organizo* (TJO), kiu en 1955 fariĝis la junulara organizaĵo de UEA : *Tutmonda Esperantista Junulara Organizo*. TEJO organizas Internaciajn Junularajn Kongresojn. Ĝi havas propran revuon : *TEJO-Tutmonde*. Kune kun UEA ĝi eldonas *Kontakton*. Ĉiuj membroj de UEA, ĝis 26-jaraj, estas membroj de TEJO. TEJO havas 9 641 membrojn. Valora servo de TEJO estas « Pasporta Servo », libreto en kiu aperas la nomoj kaj adresoj de homoj, kiuj invitas esperantistojn gastigi ĉe ili.

Alia granda esperantista organizaĵo estas *Sen-naci-eca Asocio Tutmonda*, kiu aperis en 1921. Ĝi estas politika socialisma organizaĵo, kaj eldonas la revuon *Sennaciulo*. SAT eldonis la grandan vortaron « Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto ». SAT havas ĉirkaŭ 2 000 membrojn.

Eble vi iam legis pri *Universala Ligo*. Tiu ĉi organizaĵo aperis en 1942 en Nederlando, dum la germana okupo en la milito. La celo de la organizaĵo estis tute kontraŭmilita : ĉiuj popoloj unuiĝu en komuna ŝtato. La lingvo de la nova ŝtato devos esti Esperanto. UL ankaŭ komencis eldoni propran monon por la Esperanto-Movado : « steloj ». UL dum multaj jaroj eldonis la revuon *La Praktiko*. En 1962 la organizaĵo havis 2 000 membrojn kaj estis bone laboranta. Nun ĝi preskaŭ tute ne funkcias.

Alia internacia Esperanta asocio estas *Mondpaca Esperantista Movado*. En 1953 ĝi ek-estis en la aŭstra urbo Sankt Polten. Ĝiaj celo kaj labormaniero estis kaj restas « Per Esperanto al la mondopaco ». MEM havas landajn organizaĵojn en kvardek landoj, kaj eldonas la revuon *Paco*. □



# Estraraj informoj

## Nova flugfolio

---

E.S.K. eldonis 2 000-ekzemplere novan flugfolion, por prezenti la Esperanto-Movadon. La flugfolio, helverda, enhavas ankaŭ aliĝilon.

La estraro ankaŭ priparolas la eldonon de temaj franclingvaj flugfolioj, por ebligi pli efika informado al novaj interesuloj. Le temoj estus: kiel lerni Esperanton, Esperanto kaj vojaĝoj, korespondado kaj kolektado, k.s.

Rilate informadon, la estraro provas nuntempe prilabori novan rilaton inter K.E.A. kaj E.S.K., inter la anglalingva kaj franclingva informado. Sed ĉio ankoraŭ ne estas preta.

---

## Bonvenigaj leteroj

Ekde nun, oni sendos bonvenigan leteron al la novaj membroj. Tiuj leteroj, franclingvaj aŭ Esperantlingvaj, laŭ la membrokategorio, ankaŭ iomete prezentos la Societon.

---

## Karitataj kvitancoj

La estraro plulaboras por ekhavi la rajton eldoni oficialajn kvitancoj (rilate al imposto). Pliaj informoj en estonteco.

## Membrolisto

Esperanto-Societo Kebekia ne eldonas ĉiujaran membroliston. Tamen, tiuj membroj, kiuj volas ekkoni la nomon kaj adreson de aliaj ESK-anoj, povas peti membroliston al la Societo. Ili prefere aldonu afrankitan koverton (105 mm per 240 mm). Tiu membrolisto estas iel malneta, rekte el la komputoro, sama kian la estraro uzas ĉiutage.

Meze de marto, la Societo konsistas el 110 gemembroj.

---

## Aliaj

La estraro esploras la eblecon ekhavi **subvencion** el le Ministère du Tourisme du Québec por eldoni informbroŝuron pri Kebekio en Esperanto, au eble por alia projekto.

E.S.K. havos **budon** en la Pacarango *Un geste pour la paix*, kiu okazos en la parko Jeanne-Mance, en Montrealo, dum junio semajnfino. Dejorantoj bezonataj. □

## Montrealaj paĝoj

de Patriko Mongeau

Ĉi-foje, mi rakontos al vi ĉefe pri la jarkunveno, kiu okazis la 25-an de januaro. Venis nur sep membroj, sed ni multe diskutis pri kio okazis dum la jaro 1987 kaj pri tio, kion ni ŝatus por 1988.

Unue, Normando prezentis la finanĉan raporton. Laŭ la buĝeto, ni antaŭvidis 135\$ da enspezoj kaj 1345\$ da elspezoj. Se ni subtrahas de la finanĉa raporto la cent-dolara subvencio kiun MEK transdonis al ESK, la finanĉa raporto iĝas 127,08\$ da enspezoj kaj 1364,15\$ da elspezoj. Tio tre bone kongruas al la buĝeto. Gratulon al la kasisto! Necesas klarigi, ke la buĝeto intence enhavis pli da elspezoj ol da enspezoj, pro la jubilea jaro, dum kiu ni trovis inde reklami pli ol kutime. La posedaĵoj de la klubo ebligis tian elspezon. Je la fino de la jaro, la klubo havis 942,42\$.

Due, Silvano resumis la agadon de la tuta jaro. Li interalie menciis la kreadon de la sistemo de komitatoj, kiu ne multe sukcesis, la ŝanĝon de la tago de la renkontiĝoj, la reverkon de la regularo de la klubo, kaj la provon de progresiga kurso la trian lundon de la monato, kiun neniu ĉeestis.

Tuj poste, venis longa diskuto, kies ĉefaj konkludoj estis jenaj:

Ekde nun, estos du kunvenoj ĉiumonate. La unuan lundon, ni havos kunvenon kun programo, ĉefe distra, sed povante enhavi pli seriozan parton, kiel prelegon aŭ prezenton de lumbildoj. La trian lundon, ni havos kunvenon tute liberan, al kiu oni venas por babili kaj renkonti samideanojn. Iu sugestis por tiu kunveno la nomon "rendevuo".

Oni proponis kelkajn ideojn por plibonigi la ĉeestkvanton de la kunvenoj, ekzemple, ĉiam telefoni al ĉiuj membroj la tagon antaŭ la kunveno, inviti la publikon unu aŭ du foje dum la jaro, organizi iam kunvenon al kiu ĉiu membro povas veni kun amikoj, kaj tiel plu. Turan proponis ke oni rekontaktu ĉiun Montrealan esperantiston, kiun ni konas dank'al listo preparita de Louis. Patriko de tiam faris tiun laboron kaj ŝajne allogis kelkajn personojn kiuj pli-malpli forĝis kaj estis feliĉaj denove aŭdi pri ni.

Por la kunveno kun programo, ni decidis ĉiam komenci je la 19a horo kaj duono per ludo, kaj refari la saman ludon dum multaj monatoj por ne ĉiam perdi la tempon klarigi regulojn de ludo kar esti spertaj pri ĝi nur kiam ĝi finas, kaj tiel ne ĝui bone la ludon. Ni decidis same pri la kantado. Estas malfacile ekkanti nekonatan kanton. Estas pli agrable plurfoje kanti la saman kanton ĝis ni kapablas fieri pri ĝia sukcesa kantado. Kompreneble ni iom post iom provos pligrandigi la kvanton de niaj konataj kantoj.

Ni decidis ne provi denove fari komitatojn. Martin sin proponis kiel arkiviston kaj bibliotekiston, kio eble pruvas ke kiam estas la emo, ne necesas komitato por labori, eĉ ekster la estraro.

Okazis fine de la vespero la elekto de la nova estraro. Jen la rezulto: Turan Sagafi estas prezidantino, Silvano Auclair estas kasisto, kaj Patriko Mongeau sekretario.

### **Programo de la venontaj monatoj**

aprilo: praktiko de interpretado

majo: UK en Varsovio kaj Esperanto en Bavario far Jeff Brower, kun 15 minuta video-filmo

junio: Ĉu vi preparos por ni ion?

julio: ???

**aŭgusto: Ni havos la viziton de Pol Denis kaj Mireille, el BAR-le-DUC (Francio).** Ili proponas al ni prelegon, kantadon aŭ skeĉojn, kiujn ili jam prezentis en sia klubo dum iaj esperanto-aranĝoj.

## 1992

Ĉu tiu jaro memorigas al vi ion? Tiam Montrealo ekzistos de 350 jaroj. Pro tio, Louis Langlois proponas ke ni pensu ekde nun pri tio, kion tiam indus fari. Tiucele, la estraro de MEK starigos baldaŭ komitaton, ne por organizi ion ajn tuj, sed por studi la eblecojn kaj la indecojn. Se vi havas ideojn aŭ ŝatus partopreni la studadon, kontaktu Ludovikon aŭ la estraron. En novembro, la komitato prezentos raporton pri sia studo.

## Plue pri Kebeko / Kebekio

Bertilo Wennergren ( Svedio )

Mi ĝojas, ke LA RIVEREGO publikigis mian artikolon pri Kebeko / Kebekio. Tamen mi ne tiom ĝojas pri la mallongigoj de mia teksto. Mi petis, ke mi mem rajtu fari eventualajn mallongigojn por eviti fuŝadon de mia argumentado. Nun la plej efika argumento malaperis, la listo de nomoj. Ĝi evidentigas tiom da malfacilaĵoj por la I-solvo, ke ĉiu kiu faras al si la penon ellabori nehomonimajn nomojn por la landoj en ĝi, devus konkludi, ke ni ne aldonu superflujajn I-finaĵojn.

Mi do denove provas listigi *ĉiujn de mi konatajn homonimajn landnomojn*.

( U = nomas ankaŭ urbon, R = riveron, M = monton, L = lagon ).

*Belizo U, Ĉado L, Delavaro R, Ekvadoro* – nomas origine la ekvatoron, *Gambio R, Gvatemalo U, Ĝibutio U, Kameruno M, Kebeko U, Kenjo M, Kongo kaj Zairo R* ( nomas la saman riveron ), *Kuvajto U, Luksemburgo U, Malavio L, Malto* nomas insulon, *Meksiko U* kaj federacian ŝtaton, *Misisipo R, Misuro R, Monako U, Nikaragvo L, Niĝero R* ( Niĝerio estas jam nomata laŭ tiu rivero ), *Novjorko U, Oklahomo U, Panamo U, Paragvajo R, Sanmarino U, Saotomeo U* kaj insulon, *Senegalo R, Singapuro U, Sudano* – geografia zono, *Urugvajo R, kaj Zimbabvo* kiu nomas ruinurbon.

Tiu ĉi listo tamen ne estas elĉerpa, sed nun ĉiu povas ellabori siajn preferojn. Oni transformu siajn ideojn al efektivaj nomoj, ĉar nur tiam oni povas diri, ke oni vere trapensis la aferon. Necesas montri, ankaŭ por miksitaj sistemoj, ke ili eltenas la provon de realigo.

Estas strange, ke neniu el la reagintoj al mia artikolo, tuŝis la fakton, ke mi apogas min sur rekomendoj kaj oficialigoj de la Akademio de Esperanto. Ankaŭ arogis diri Kajmo Brent, ke mi konsideras Esperanton kiel projekton, kun kiu mi ludas en mia kabineto. Kajmo Brent tute ne konas min ( foje mi dubas, ke eblas esti pli konservativa Esperantisto ol mi ) kaj li evidente ne legis miajn aliajn artikolojn pri la landnoma problemo. En Akademias Studoj 85, eblas konstati, ke el ĉiuj kiuj enmiksigis detale en la landnoman debaton, mi sola respektas la tradicion kaj vivantecon de Esperanto ( escepto nun estas d-ro Albault, kiu lastatemoe ŝajnas esti draste reviziinta siajn antaŭajn ideojn ). Pri la decidrajto pri landnomo eblas argumenti, ke ĝuste ĉar la landanoj uzas la nomon plej ofte, ili *ne* decidu. Ilin ne povas praktike ĝeni la formo de la nomo, ĉar ili ĉiukaze parkerigos ĝin, devante ĝin ade uzi !, dum aliaj, kiuj uzas ĝin tre amlofte havas bezonegon, ke ĝi estu facile rekonebla, kaj formita sen strangaj principoj, kiuj ne validas por aliaj nomoj. Por ni Kebeko estas la sola rekta kaj senartikika Esperantigo de Québec. La sola, kiun ne necesas parkerigi – eblas ĝin ĉiufoje rekonstrui.

Mi *ne* asertis, kiel plendis Kajmo Brent, ke ni devas ŝanĝi 30 nomojn se ni konservas la formon Kebekio. Mi diris, ke tion ni devas, nur se ni ne kuraĝas proponi miksitajn sistemojn. Ambaŭ reagintoj tion ja kuraĝas, sed ili ne detaligis siajn preferojn. Petro Collinge ŝajnas preferi tre skemisman solvon kun -i- en preskaŭ ĉiuj kazoj. Li ellaboru sian sistemon ! Ĉu ĝu enhavos ekz. la formoj Monakio, Gambiio, Kenjio, Maltio, Sanmarinio kaj Santomeio ?

Kajmo Brent preferas la lingvouzon, kvazaŭ ĝi estus unueca. Ĝi certe estas mala al la preferoj de Petro Collinge ! Kajmo Brent montru detale kia ĝi estas ! Mi ŝatus demandi al li : Kio pri la jamaj decidoj de la Akademio ? Ĉu vi volas unuecon en la uzado ? Mi volas nek superlogikon, nek nepran regulecon, sed mi volas iom da unueco en la uzado. Kiamaniere ni atingu tion, Kajmo Brent ?

Komencantoj plendas, ke ekzistas tiom da variantoj por ĉiu landnomo en Esperanto. Ili trovas la landnomojn tre ĝena parto de nia lingvo. Guste ili bezonas norman landnomliston, kaj tian estas ellaboranta la Akademio. Mi intencas ĝin sekvi, kiam ĝi estos publikigita. Ĝi certe forte respektos la tradicion de nia lingvo, same kiel mi faras. Ĉu Petro Collinge kaj Kajmo Brent same agos ?  
( Januare 1988 ) □.

---

## Cours d'espéranto à San Francisco

d'après Edmond Brent

Comme chaque été depuis bientôt vingt ans, l'Université d'État de San Francisco offre une série de cours intensifs d'espéranto. Mais cet été, on retrouve, parmi les trois professeurs, un Québécois, M. Edmond Brent.

### Les cours

Il y a quatre cours principaux, dont trois cours de langue à proprement parler : niveaux débutants, intermédiaire 1 et intermédiaire 2. Le quatrième cours, considéré de niveau supérieur, est en fait un cours d'espérantologie, portant sur les aspects socio-linguistiques de l'espéranto. Il faut bien connaître l'espéranto pour le suivre.

En plus de ces quatre cours parmi lesquels les étudiants doivent en choisir un, on peut aussi suivre un cours sur « les méthodes d'enseignement de l'espéranto ». En outre, un laboratoire de langues informatisé est à la disposition de tous les étudiants.

### Les coûts

Pour chacun des quatre cours principaux, les frais de scolarité s'élèvent à 260 US\$. Le cours optionnel sur les méthodes d'enseignement coûte 85 US\$ en sus. Un logement aux résidences de l'Université, dans des chambres doubles, coûte 140 US\$ par semaine. On offre trois repas par jour en semaine, et deux ( déjeuner et souper ) en fin de semaine.

On doit souligner qu'il s'agit de vrais cours universitaires, offrant des crédits qu'on peut utiliser pour obtenir un diplôme. Les cours principaux offrent trois crédits tandis que le cours de méthodes n'offre qu'un crédit.

### Les professeurs

Tous les cours sont donnés par l'équipe de trois professeurs. En plus de Edmond Brent, planificateur linguistique ( entre autres à l'Office de la langue française ), on retrouve M. Amri Wandel, astrophysicien, très impliqué dans le mouvement espérantiste, et M. Duncan Charters, professeur de langue.

### Les dates

Les cours auront lieu de 27 juin au 15 juillet. Fait intéressant, le congrès de l'Association états-unienne d'espéranto a lieu, cet été, à San Diego, du 15 au 20 juillet. Une bonne occasion d'utiliser le savoir récemment acquis.

Il est possible de recevoir des bourses. On en fait la demande en écrivant en espéranto un résumé de son implication dans le mouvement espérantiste.

Pour les bourses, l'inscription et tout autre renseignement, écrire à :

M<sup>me</sup> Cathy Schulze  
410 Darrell Road  
Hillsborough CA 94010  
ÉTATS-UNIS



## Maja renkontiĝo – une rencontre en mai

La estraro de E.S.K. organizis kvinan printempan renkontiĝon, kiu okazos dum la semjanfino 28-a kaj 29-a de majo.

Ne estas fiksa programo : ni jam spertis, ke tian programon oni neniam sekvas. Tamen, ni antaŭplanas multajn aktivecojn, kiajn interparoladon, kunkantadon, aŭskultadon de prelegetoj, ludojn, promenadon en naturo kaj en la proksima urbo, k.t.p. Estos aranĝita kurso aŭ konversacia rondo por komencantoj.

La organizantoj bonvenigas ( t.e. petas ) kontribuojn ( espereble laŭtemajn ) de la partoprenantoj : ĉiu havas ion por komuniki al la aliaj. Nur tiel estas certe, ke ni ĝuos buntan kaj interesan programon.

La cinquième rencontre printannière de la S.Q.E. aura lieu lors de la fin de semaine des 28 et 29 mai. Pour la première fois, elle a un thème : les voyages.

Il n'y a pas de programme fixe — on ne réussit jamais à suivre un tel programme — mais de nombreuses activités sont prévues : discussions, peut-être conférences ( en espéranto ), chant, jeux ( principalement des jeux « linguistiques »... ), promenade dans la région environnante. Il y aura des activités spéciales — cours ou conversations dirigées, selon le niveau — pour les débutants.

- **Prix – Prezo** : 10 \$ sans repas – sen manĝoj  
35 \$ avec les repas – kun manĝoj

- La programo komenciĝas je la 10 h, sabaton matene, kaj finiĝas dum la dimanĉa posttagmezo. Tamen, estas gastejo, kaj eblas alveni pli frue aŭ resti pli longe ( kontraŭ pago ). La sabata tagmanĝo ne estas inkluzivita. Estas kuireblecoj.

Les activités commencent le samedi à 10 h et se terminent le dimanche après-midi ; on peut toutefois arriver plus tôt ou rester plus longtemps : il s'agit d'une auberge, et il suffit de payer. Le dîner du samedi n'est pas inclus. On peut faire sa propre cuisine.

- **Limdato : 1-a de majo. Date limite d'inscription : 1<sup>er</sup> mai.**

- **Noto** : estas entute 9 ĉambroj, du-, tri-, kvar- kaj ok-homaj ( ĉefe kun duopaj litoj ). Note : l'auberge compte en tout neuf chambres, pour deux, trois, quatre et huit personnes, surtout avec des lits doubles.

- **Eblas aranĝi grupan transporton.** Il y a possibilité d'organiser un transport de groupe. Mentionnez vos besoins lors de l'inscription

- **Ĉiu kunportu sian littukojn, aŭ dormsakon, aŭ luan surloke.** Chacun doit apporter ses draps, son sac de couchage, ou en louer sur place.

**Aligilo al la maja renkontiĝo – Bulletin d'adhésion à la rencontre de mai**

Nomo :

Adreso :


poŝta kodo :

Telefono :

Transportilo – Moyen de transport

Mi proponas la jenan kontribuon al la programo :

Kun manĝoj Avec repas (35\$)  Sen manĝoj Sans repas (10\$)



• **Loko – Lieu :** Auberge le Mas des Cantons, 15, rue Georges-Bonnalie, EASTMAN 514 / 297.3584. Accessible par l'autobus Voyageur (arrêt en face de l'auberge ; demander au chauffeur). L'Auberge est située dans la pittoresque ville d'Eastman à 5 minutes du Mont Orford et des sentiers de l'Estrie. La gastejo estas en la urbo Eastman, tute proksime al Mont Orford kaj al la padoj de Estrie.

Sendu la aligilon kaj la ĉekon al Esperanto-Societo Kebekia.

Envoyer le formulaire d'inscription, accompagné d'un chèque, à la Société québécoise d'espéranto.

Société québécoise d'espéranto

C.P. 126, succ. « Beaubien »

Montréal H2G 3C8

514 / 495.8442

# La Riverego

Esperanto-Societo Kebekia

Marto 1988-a. N-ro 10-a.

Ĉi-numere :

Maja renkontiĝo - une rencontre en mai

( limdato : 1-a de majo )

En la *Verdinsuleto*

Rezultoj de la informa kampanjo

Quelques organisations... en espéranto facile

Plue pri Kebeko / Kebekio

Cours d'espéranto à San Francisco

Société québécoise d'espéranto

C.P. 126, succ. « Beaubien »

Montréal H2G 3C8